

FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Organo de FRANCA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, filio de IKUE

===== LA HOUSSAYE-EN-BRIE (Seine-et-Marne) FRANCE ===

Redaktoro : S-ro Gaston VERON, pl. de la Petite Bruyère, DOMFRONT (Orne)
Sekretariino : F-ino J. LE BOEDEC, 18, rue Ernest Cresson, PARIS-14°
Kasisto : S-ro J. LIGOT, 30, rue Fernand Segouin, ARNOUVILLE-LES-GONESSE
C.C.P. - PARIS - 51 74 79 - (Seine-et-Oise)

Abonnement : 2 Fr- Adhésion à la Ligue : 1 Fr-; Total = 3 Fr--

N° 62 --- BULLETIN TRIMESTRIEL --- TRIMONATA BULTENO ---
Sankta Pio X, preĝu por ni. Julio 1964.

V O R T O J D E L ' P A P O

Cio, kio koncernas la homan progreson, atentigas Nin kaj, se la progreso esprimas la homan genion, ĝi trafas ĉe Ni aprobon kaj favoron. Kaj se la homa genio estas helpata per naturaj virtoj, Altgrade grandigitaj kaj aldonitaj al kompleksa kaj komunuma organiso, Ni sentas Nin devigata omaĝi ĝin kaj doni al ĝi nian helpon kaj protekton, kiom nur eble. (Parolado en la 6-a interna-cia kongreso pri aera kaj spacia medicino, laŭ Osservatore Romano 6-X-1963).

Ni ankaŭ, kiel heredanto de la pastora misio, kiu dum la jarcentoj konsideris Eŭropon, kiel solidaran kristanaron, Ni deziras unuiĝinta Eŭropon? Ni ne povas ne deziri, ke progresu kaj sukcesu per konkretaj kaj definitivaj rezultoj la procezo, el kiu Eŭropo eliros pli unuiĝinta, pli liberigita de privataj intereso kaj landaj rivalecoj, kaj pli ligita kun la reciproka interhelpa sistemo. (Parolado en la Konferenco de la Eŭropa porpaca Movado, laŭ Osservatore Romano 10-X-1963)

=====

Dio estas Amo.

....."Kiam vi debatos la fruktojn de via olivarbo, ne debatu ĝis fino : io restu por la fremdulo, por la orfo, kaj por la vidvino. Kiam vi rikoltos en via vinberejo, ne forkolektu la restaĵon post vi : io restu por la femdulo, por la orfo, kaj por la vidvino. Kaj memoru, ke vi estis sklavo en la lando Egipta; pro tio mi ordonas al vi agi tiel. (el Readmono, XXIV, 20-22-)

....."Novan ordonon mi donas al vi, ke vi amu unu alian; kiel mi amis vin, tiel vi ankaŭ amu unu alian. Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al alia.
(el Johano, XIII, 34 - 35-)

=====

LE PAPE RECOIT LES CATHOLIQUES ESPERANTISTES
=====

Le 19 Mai 1964, le Pape Paul VI a reçu en audience privée M. l'Abbé Beckers, Président de l'Union Internationale des Espérantistes Catholiques, et d'autres Dirigeants de cette Association.

Le Pape a témoigné un vif intérêt pour leur action, reconnaissant la nécessité et l'utilité de l'Espéranto et encourageant cette langue qui sert la compréhension entre les peuples et favorise la concorde et la paix.

Il s'est vivement intéressé au développement du mouvement catholique espérantiste et à ses éditions. Le Président Beckers lui a remis en hommage une collection reliée de la revue Espero Katolika, ainsi que quelques ouvrages de la série Kristana Kulturo (Culture chrétienne) parmi lesquels la traduction en espéranto de l'encyclique "Pacem in terris".

Le Saint Père a remarqué qu'en ce temps d'oecuménisme, la langue Espéranto peut être très utile au monde chrétien.

=====

BILETO DE LA PREZIDANTO :

" KRISTANA KULTURO "

Qui, parmi nous, ne se sent atteint à la lecture d'articles et d'ouvrages témoignant d'une incompréhension totale à l'égard des hommes se réclamant du Christianisme ?

La presse sans frontière du mouvement espérantiste ne véhicule pas qu'une pensée neutre, et nous y rencontrons des articles révélant une vision résolument étrangère, parfois même hostile à la foi, à la pensée chrétienne. Leurs auteurs se laissent aller à la confusion entre celle-ci et certaines compromissions d'un monde baptisé avec la poursuite des buts essentiellement temporels. Ils se laissent ainsi prendre au jeu de ceux qui ont su exploiter et aliéner le christianisme, sans égards, pour son caractère essentiellement spirituel.

Aussi est-ce une grande joie de voir paraître en Espéranto le texte de l'Encyclique "PACEM IN TERRIS", et de voir figurer dans nos bibliothèques cette réponse amicale et fraternelle à ceux qui ne connaissent les chrétiens qu'à travers les critiques matérialistes.

Combien il est nécessaire que notre esprit soit représenté parmi ce qui s'imprime en Espéranto, comme est utile et précieuse la présence de nos frères chrétiens au sein des mouvements et des assemblées à but culturel.

Lors des congrès universels, la célébration de la Messe, les réunions de chrétiens doivent conserver la place qu'une tradition solidement établie leur a donnée. De même, dans les sections dont le but est scientifique, social littéraire, la présence de ceux qui croient au spirituel est une nécessité et une richesse.

.../...

Que d'hommes se croient d'avant-garde parce qu'ils affirment que leur science efface la Foi; comme s'ils ne s'avouaient que la connaissance, à mesure qu'elle progresse, pose de nouvelles questions, soulève des problèmes, qui tous débouchent sur le Mystère et l'Infini.

La mission de notre presse et de nos éditions, si humbles soient-elles, est d'apporter un témoignage, de continuer à révéler à ceux qui cherchent avec loyauté la vie intense du croyant son enracinement en notre temps, certes, mais aussi la prééminence du Spirituel éclairant toutes choses.

Catholiques Espérantistes, soutenons cette action avec nos forces, avec tous nos moyens, en aidant ceux qui s'emploient avec tant de dévouement à animer, au sein du Mouvement Universel, la diffusion de la Culture Chrétienne.

R. Cl. COLAS.

=====

ANTAŬ 50 JAROJ MORTIS Sta PIO X-a

Pio X-a, - Josefo Sarto -, la dua el dek fratoj, naskiĝis la 2-an de Junio 1835 en Riese, urbeto en la provinco de Treviso, situanta sur la vojo, kiu kondukas de Castelfranco al Asolo. Lia patro, Johano Baptisto, estis urba pedelo; lia juna patrino, Margerita Sanson, el Vedelago, estis kudristino. Li ricevis la unuan instruadon en Riese. De novembro 1846 al aŭgusto 1850, li povis senpage viziti la unuajn kvar klasojn de la gimnazio en Castelfranco, kie li ofte iris per nudaj piedoj. Poste Kardinalo Monico, ankaŭ devena el Riese kaj tiam Patriarko en Venecio, havigis al li lokon en la seminario de Padovo, kie li eniĝis dum novembro 1850, kiam li estis 15-jara. La 18-an de septembro 1858, kiam li estis 23-jara, Josefo Sarto ricevis la pastrecon en la ĉefpreĝejo de Castelfranco. La morgaŭan tagon, li celebris sian unuan sanktan meson en la paroĥa preĝejo en Riese.

En la monato Novembro de la sama jaro, li fariĝis vikario en Tombolo, urbeto en la provinco de Padovo, kie li ankoraŭ loĝis en 1866, kiam la regiono estis kunigita al Italujo. Li tie restis ĝis la fino de la somero de 1867, kaj tiam ricevis la paroĥestran oficon en Salzano, apud Noale, en la provinco de Venecio. Li tien restis ĝis la 27-an de novembro 1875. Je tiu periodo, la episkopo Zinelli sendis lin al Treviso, kiel kanonikon en la ĉefpreĝejo, religian direktoron en la seminario kaj kancelieron de la episkopa kurio.

La 16-an de novembro 1884 oni konsakris lin, kiel episkopon de Mantovo, sed - ĉar li devis atendi la registaran ekzekvaturon - li povis enoficiĝi nur la 13-an de aprilo 1885, post la Paskofesto.

Dum la konsistorio de la 12-a de junio 1893, li estis proklamita Kardinalo kaj tri tagoj poste nomita Patriarko en Venecio, por esti posteulo de Lia Patriarka Moŝto Agostini, mortinta la 31-an de decembro 1891.

...///...

...///...

Sed la Kardinalo Josefo Sarto restis en Mantova ĝis la fino de la aŭtumno de la jaro 1894, ĉar la itala registaro pretendis kontroli la nomumon de la Venecia Patriarko pro supozita rajto de patronado. Finfine la dezirata ekzekvato de la registaro alvenis la 5-an de septembro 1894 kaj li triumfe eniris en Venecion, la 24-an de novembro.

Je la morto de Leono XIII-a (la 20-an de junio 1903) Kardinalo Sarto foriris de Venecio por ĉeesti la kunklavon kaj salutis siajn tri fratinojn, kiuj vivis kune kun li, per la koraj vortoj : "ĝis la bladaŭa revido" (°). Sed la mardon 4-an de aŭgusto, Kardinalo Sarto estis elektita, kiel Papo sud la nomo de Pio X-a kaj neniam revenis al Venecio.

Li mortis pro ĉagreno, la 20-an de aŭgusto 1914, ne longe post la komenco de la unua mondmilito, kiun li serĉis reteni, sen sukceso.

La 3-an de junio 1951, Papon Pio X-, la kompatinda kampanara paroĥestro, kiel li ŝatis sin nomi, oni proklamis, kiel beatulon. La 29-an de majo 1954, li estis altigita ĝis la gloro de la altaroj, kiel Sanktulo.

(El itala broŝuro pri Pio X-a, tradukis K.)

(°) = Li eĉ aĉetis ir-kaj reiran bileton ! (Noto de la Tradukinto)

=====

ESPERANTISTAJ FERIOJ

..... inkluzivas multon : de la partoprenado en diversaj internaciaj kunvenoj, ĝis la daŭrigo, eventuale pliintensigo de la individuaj klopodoj en la T.N. propagando, ne forgesante la nutradon de nia Esperanto-scio per legado, kion permesas libertempoj.

Tiuj tri elementoj estas esencaj por la Movado; tial ni ĝoju, eĉ se ni ne flanklasu, dum niaj ferioj, la gravan devon, por ĉiu el ni, paroli pri nia afero; kaj ni ĉiam, en la pakajoj, aŭ en la poŝo, havu unu el tiuj Esperanto-libroj, kiujn de longe ni deziras legi.

Niaj revuoj regule anoncas pri la diversaj kongresoj kaj kunvenoj; eĉ nur kunvenetoj inter diversurbaj gesamideanoj povas esti interesa; des pli grave estas provi partopreni Univerŝalan Kongreson, aŭ internacian kunvenon de faka asocio; aŭ sesion en Gresillon.

U.E.A. ĵus iniciatis novan kampanjon ĉe UNESKO; ni tion partoprenu senhezite, cele al nova, grava paŝo al la fina celo.

Pri legado, ekzistas tiom multaj kaj diversaj libroj, ke ĉiu povas trovi, kion li bezonas. Pri tiu speciale punkto, ni iom bedaŭras, ke ne pli da personoj interesiĝis pri la "Libro Prunt-Servo"; ni do intencas renovigi la aferon, esperante, ke ni trovos pli da favoraj reeĥoj. Cetere, la Libroservo de "Espero Katolika" estas je ĉies dispono por plenumi ĉiujn mendojn; vi povas mendi kaj pagi al la Landa Repraŝentanto, kiu transsendos.

.../...

.../...

Ni ankaŭ volas rememorigi, ke IKUE kreis novan kategorion de membroj, t.e. "Membro kun Jarlibro" : kontraŭ 3 Fr.F., ĉiu ricevas la jarlibron de IKUE, kiu enhavas multajn informojn pri la Katolika Esperanto-Movado, liston de Episkopoj kaj sacerdotoj membroj de la Ligo, liston de Delegitoj, k. a.- Oni povas tiel kontakti ne-esperantistojn kaj peti de li tiun malaltaⁿ kontribuon, kompanse de la Jarlibro.

Bonvolu ĉiu pripensi tiujn punktojn jam nun, kaj poste dum la somero.

=====

Eksperimento de
DISDONADO DE KATOLIKAJ GAZETOJ.

Kiu volas havi ĝeneralan informon pri la problemoj de la katolika gazetaro tiu legu fakajn gazetojn troveblajn en ĉiu lando.

La celo de mia artikolo estos pli limigita, nome, kiel praktike estas aranĝita la disdonado de la katolikaj gazetoj en mia urbeto.

Tiu urbeto, E... , situiĝas 20 kilometrojn sude de Parizo, en regiono, antaŭ 50 jaroj kampara, nun urba, en kiu konstante kreskas novaj domoj, foje domegoj. Se la ritmo pluiras, baldaŭ jam ne restos kulturebla grundo inter E... kaj Parizo.

La loĝantaro konsistas el proksimume 5.500 homoj, kies triono estas freneza... Ne, mi ne ŝercas ! Sur la teritorio staras granda frenezulejo, kun eble 2.000 pacientoj, kaj kompreneble la statistiko ilin enkalkulas.

Pro la proksimeco al Parizo, la plimulto el la sanaj loĝantoj de E... laboras en la ĉefurbo. El ĉiu domo, ĉiumatene, unu ĝis tri aŭ kvar homoj iras al la stacio, aŭ piede, aŭ per automobilo lasata antaŭ la stacidomo, ĉar la trafiko en Parizo fariĝas tia, ke oni perdas tiom da tempo por lokigi la aŭtomobilon, kiom por veturi.!

Tamen, kelkaj laboras en apudaj urbetoj, Bretigny aŭ Juvisy.

La metiistoj en la urbeto estas malmultaj : ŝuistoj, seruristoj, fotografistoj, horlogistoj.

La plimulto de la komercistoj grupiĝas en du kvartaloj : la "Grande Rue", kaj apud la stacidomo. Ĉar iliaj butikoj estas malfermitaj dimanĉmatene, ili ne povas ĉeesti Meson en E..., la plej fervoraj ĉeestas vesperan Meson en alia urbo.

Laŭ statistiko en marto 1954-a, 14 % de la homoj ĉeestis Meson dum ordinara dimanĉo : inter ili, la duono konsistas el infanoj, devigataj pro katekismo. La proporcio estas tamen tre granda je la gravaj tradiciaj festoj, Kristnasko, Palmdimanĉo, Pasko.

La Urba konsilantaro konsistas grandproporcie el Katolikoj.

...//...

.../...

Neeble estas ekscii kiom da paroĥanoj estas rektaj abonantoj de katolika gazeto, aŭ ĉiutage (La Croix), aŭ semajne ; same pri la gazetoj por infanoj; mi do limiĝos al la po-numera vendado de katolikaj gazetoj.

Dum kutima dimanĉo, oni disvendas 80 "Vie Catholique", 35 "Pèlerin", 45 "78-Actualités", 12 "Télérama", 12 "Pax-Christi", ĉiumonate estas vendataj 40 "Panorama Chrétien", kies kosto estas 1 fr 50⁷. Krome, 8 aliaj fakaj gazetoj (por junuloj, junulinoj, skoltoj, Bibliemuloj) sed la tuta nombro ne atingas 10 ekzemplerojn.

X. Dauchez.

(Sekvota)

=====

DEZIRAS KORESPONDI

..... Kun franca samideano, membro de Societo St-Vincent-de-Paul :
S-ro E. H. DAWSON, 17 Aparima Avenue, Miramar, Wellington E4,
NCV ZELANDO

=====

Dépot légal : 3° trimestre 1964	/// Polycopié par	✓	F.M.C.-
Papier de Presse : N° 34.745-	///		Prieuré Saint-Martin
Directeur-Gérant : Gaston VERON	///		La Houssaye-en-Brie,
	///		(Seine-et-Marne)

=====